

Tekniko: inteligenta poŝamiko

29a jarkolekto - oktobro 2008/10

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Ŝtelo iĝas
kutimo**

**Tabako
tabua**

**Nombro de militistaj
invalidoj kreskas**



Baldaŭ komenciĝas la 30a eldonjaro de MONATO.

Por festi tion, MONATO havigos aron da avantaĝoj al siaj abonantoj.

Do rapide repagu vian kotizon, ĉar specialaj ofertoj en la jaro 2009 havigos al vi eblecon por regajni eĉ pli ol la tutan kotizon. Por ke vi certe ne maltrafu tion, vi trovas ĉi sube jam unuan avantaĝon: 20%-a rabato por la ĉi-sekvaj libroj! Se vi mendas la tutan kolekton vi jam realigas ŝparon de 15,60 eŭroj!

- | | | |
|--|------------------|---------|
| • La asocio | 24,00 | 19,20 € |
| (baldaŭ aperos, sed jam nun antaŭmendu/ priskribo ĉi-sube) | | |
| • Dormanta Hejmaro | 16,00 | 12,80 € |
| • Sur Parnaso | 12,00 | 9,60 € |
| • Mortiga ekskurso | 10,00 | 8,00 € |
| • Aventuroj de Pinokjo | 10,00 | 8,00 € |
| • Nigra Magio | 6,00 | 4,80 € |

Tiu ĉi oferto validas ĝis 2008/12/31 por MONATO-abonantoj, kiuj mencias tiun ĉi anoncon en sia mendo. Al la menciitaj prezoj aldoniĝos la reala afranko, kun minimumo de 3 eŭroj.



La Asocio

Finfine firmfundamenta historio!

Doktoro Ziko Van Dijk pretigis Esperantan libron, 304-paĝan. Ĝi ne estas “plena historio de Esperanto”, sed tamen de la plej grava parto de ĝi, nome la historio, sub la ombrelo de UEA. Kaj nepre estas vere la unua nia historio, kiu havas firman sciencan bazon. Ziko funde esploris ĉiujn gravajn dokumentojn en la Centra Oficejo, kaj ne nur tiujn dokumentojn, sed ankaŭ multajn kiujn li ricevis de aliaj instancoj. Granda avantaĝo estas ke en multaj “historietoj” ambau partioj povis konigi siajn argumentojn, kiuj ofte ne estas troveblaj en nia gazetararo! Ĉe konfliktoj en nia asocio ja tre ofte okazas ke unu en la koncernataj partioj estas buŝumita, pro manko de diskoniga organo!

Kiu volas paroli pri Esperanto-historio, kaj ne nur klaĉi “el la nuko”, nepre bezonas seriozan studadon de tiu ĉi monumenta verko.

(pds)

Tabako tabua

La aŭstra parlamento akceptis severan leĝon kontraŭ fumado en restoracioj. La leĝo postulas limigitajn zonojn por fumantoj. Nur en establoj kun areo ĝis maksimume 50 m² la estro libere povas decidi, ĉu li permesas fumadon.



9

Inteligenta poŝamiko

La 11an de julio en pluraj urboj de Eŭropo staris vicoj antaŭ vendejoj, kelkfoje eĉ la nokton antaŭe. Ĉie pluraj dekoj da emuloj atendadis por povi aĉetisian ekzempleron de iPhone 3G, la plej freŝa produkto de Apple. Kio estas iPhone 3G, kaj ĉu vere valoras vicostari por povi akiri ĝin? Monato testis la aparaton kaj raportas.



12

La barata ekonomio: miraklo neefika

Oni kutime nomas la aktualan periodon ekde 1991 la reforma periodo de la barata ekonomio. Dum tiu ĉi periodo pro diversaj strategioj oni „liberigis” la merkatojn kaj rapide ekkreskis la ekonomio. Rezulte, ekzemple, la fremdvalutaj rezervoj en la lando kreskis de 6 miliardoj da dolaroj en 1991 ĝis 208 miliardoj en 2007. Jen Barato Lumanta kaj Nekredebla Barato laŭ politikaj sloganoj.



24

politiko

INTERNACIAJ RILATOJ	8
Novaj hejmoj por drako kaj urso	
BALKANIO	8
Memorante miton	
GAZETARO	8
Ĵurnalistoj arestita	

moderna vivo

KOMUNIKADO	9
Ho, ve ...	
FUMADO	9
Tabako tabua	
LITOVIO	10
Vivi malpli longe	
FAMILIOJ	10
Kvinopa sukceso	
HOMOJ	10
Saĝa decido	
INSTRUADO	11
Leciono pri korupto	
TEKNIKO	12
Inteligenta poŝamiko	
KRIMADO	14
Interŝtata murdo	
ALBANIO	14
Lando sur- kaj sub-tera	

ekonomio

VATIKANO	15
La kontoj de Vatikano kaj de la Sankta Seĝo	
FRANCIO	15
Ŝtelo iĝas kutimo	
ALBANIO	16
Ankaŭ eksterlandanoj aĉetas domojn	
USONO	16
Nombro de militistoj invalidoj kreskas	

medio

ELEKTRONIKO	17
Pli kaj pli da rubo al la tria mondo	

turismo

BULGARIO	18
Adiaŭo al la „dancantaj ursoj”	

lingvo

EŬROPO	19
La kornvala ne mortinta!	

spirita vivo

BIBLIO	20
Vulgato, Vulgatoj, Nova Vulgato	

libroj

Moderna klasikaĵo	22
Ne por lernantoj, sed por spertuloj	23

eseo

La barata ekonomio: miraklo neefika	24
---	----

sporto

FUTBALO	26
Hispanio venkis, gastigantoj seniluziigis	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	49	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	49	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	49	27,6	5	9
Honkongo	EUR	42	45	25,2	5	9
Hungario	EUR	26	29	15,6	5	9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalio	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Singapuro	EUR	42	45	25,2	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	42	45	25,2	5	9
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, Tehran.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esprent@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzjuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a

- Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
- > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelo-sev@public.srce.hr.
- > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlandaj:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zcirić@eunet.yu
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Historia histerio



Ĉu vi ankoraŭ memoras pri danĝeroj, kiuj oni dire grave minacis nin, jen en iuj partoj de la mondo, jen tutmonde. Estis ekzemple malsanoj aŭ venenoj. Kiam vi la lastan fojon aŭdis aŭ legis pri Ĉernobilo? Frapis min mencio pri ĝi okaze de akcidentoj en francaj atomcentraloj ĉi-somere. Sed ĝenerale la giganta atomkatastrofo, kiu minacis grandajn partojn de Eŭropo kaj Azio, estas forgesita. Do mi traktis mian memoron pri aliaj danĝeroj, kiuj timigis nin en pasinteco. Ĉu vi ankoraŭ scias, kio estis „bovofrenezo“ (laŭ la populara nomo)? Malsano de ŝafoj kaj bovoj, kiu estis riska ankaŭ por homoj, kiel oni distrumpetis dum multaj jaroj. Kiel malaperis (kun la miloj da mortigitaj malsanaj bestoj) ŝajne komplete tiu malsano, sen ke vere multaj homoj infektiĝis? Sekvis tiel nomata „birdogripro“, pro kiu oni avertis infanojn, kolekti plumojn. Jes, mortis ne malmultaj anasoj, anseroj kaj aliaj sovaĝaj kaj kortaj birdoj, sed ankaŭ en tiu okazo mi nek legis nek aŭdis pri gravajn infektiĝojn en Eŭropo (jes en Azio, de kie venis tiu malsano). Intertempe neniu plu parolas pri birdogripro.

Pli danĝera evidente estis malsano nomata „sarso“, pro kiu (denove en Azio) mortis relative multaj homoj, sed ankaŭ ĉi-foje aver-

toj por Eŭropo estis troigitaj. Nur ege malmultaj eŭropanoj infektiĝis (kutime dum vojaĝo en Azio). Ĉi-jare en Germanio oni ĝojigis nin per la informo, ke tiu ĉi lando definitive estas senrabia. Fiere la fakuloj informis, ke tiun sukceson oni dankas al ampleksa programo por vakcinadi vulpojn kontraŭ rabio.

Kiel ajn, la rilataj histerioj, kiujn estigis nelaste miaj ĵurnalistaj kolegoj en amaskomunikiloj, montriĝis troaj kaj superflujaj. Tiuj histerioj nun estas historiaj. Ĉi-jare en Germanio oni emfaze avertis pri kreskinta danĝero pere de iksodoj, kiuj pli abundas pro klimatoŝanĝo. Sed jam estas aŭtuno, kaj mi legis kaj aŭdis pri eĉ ne unu grava infektiĝo ... Do denove histerio, kiu nur iritas homojn. Restas tamen unu grava malsano mortdanĝera: aidoso. Sed ankaŭ pri ĝi oni preskaŭ ne plu parolas en evoluintaj landoj, neglektante hejmajn malsanulojn. Jes, en Afriko daŭre amase mortas homoj pro aidoso. Sed Afriko estas ekster la interesosfero de la norda hemisfero.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciale. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Ĉu flandra, ĉu valona?

En la artikolo pri la datreveno de Atomiumo (MONATO 2008/7, p. 13) Lode Van de Velde diras, ke la arkitekto de tiu konstruaĵo estis „André Waterkeyn, flandra inĝeniero (1917-2005), kiu fariĝis en 1954 ekonomia direktoro de la federacio de la flandra metal-industrio, Fabrimetal”.

Ĉu Waterkeyn estis flandro, tion mi ne scias. Lia filino estas franclingva bruselanino. Sed eble ŝi lernis la francan nur de sia patrino? Ni lasu la dubon.

Sed ke tiu sinjoro Waterkeyn neniam laboris por la „federacio de la flandra metalindustrio”, pri tio mi estas tute certa. Fabrimetal estis kaj ankoraŭ estas la federacio de la tutbelga metal-industrio. En 1958 (jaro de Atomiumo) la plej grava subsektoro de tiu industrio estis la fero- kaj ŝtal-industrio, kiu tiam estis tute valona afero. La granda uzino de Sidmar en Zelzate (Flandrio) datiĝas de post 1960.

Martin DECALUWE
Belgio

Iam morti rapide

Pri la utilo de la sporto mi havas tute alian opinion, ol Stefan Maul (MONATO 2008/8-9, p. 5). Li pene uzas statistikon por pruvi, ke – rilate la vivodaŭron – tempogajno per sporto estas nula. Mi volas memori, ke ankaŭ manĝado, dormado kaj amorado rabas tempon. Mirindaj rabistoj.

Ĉar mi preskaŭ ĉiun tagon praktikas sporton, mi kutime sentas trankvil-animecon, korpan kaj psikan kontentecon; malsanon mi preskaŭ ne konas. Maul skribis: „Kiu sportumas, ne vivas pli longe, sed mortas pli sana. Kia konsolo!” Ĝuste tion mi volas: iam morti rapide. Kion mi ne volas, estas longe kaduki aŭ eĉ vegetadi. Je nia sano!

Michael J. SCHERM
Germanio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Israelo 60-jara (3)

En la leteroj de la aŭgusta-septembra numero de Monato aperis du reagoj al mia artikolo „La juda ŝtato – 60-jara” (MONATO 2008/7, p. 10-11). Skribas František Horáček: „Estis malbone elektita la loko por la nova ŝtato ... post la estiĝo de la nova ŝtato komenciĝis la bataloj kun la origina loĝantaro”, kaj en la dua letero skribas Andrea Fontana, ke la judoj devis elekti la tiam al ili proponitan regionon en Afriko, ĉar en Palestino ja troviĝis loka loĝantaro.

Ambaŭ leteroj ege ofendis min: mi estas filo de la antikva juda popolo, kiu naskiĝis en Israellando (Palestino) antaŭ miloj da jaroj. Sur la sama tero, kie mi sidas nun, vivis tiam miaj prapatroj, kiuj kreis la mirindan eternan judan kulturon, parolis la saman lingvon uzatan nuntempe en mia hejmo kaj preĝis al la sama Dio. La cionistaj pioniroj, kiuj komencis reveni al Israellando en la fino de la 19a jarcento, kulturis ties neloĝatajn terenojn (temas pri teroj, sur kiuj ne sidis araboj!), sekigis marĉojn kaj kreis denove sian antikvan socion-lingvon-kulturon-ŝtaton, nepre ne devis kaj ne povis elekti alian lokon en la mondo. Same kiel mi ne kuraĝos diri hodiaŭ al la palestinaj araboj iri aliloken kaj fondi tie ilian ŝtaton, oni ne rajtas malpermesi al la juda popolo konstrui sian ŝtaton kaj sian estontecon en sia origina sankta patrujo.

Mi deziras ankaŭ substreki, ke la sangoverŝadon ne komencis la judoj. UN decidis en 1947 fondi du ŝtatojn: judan kaj palestinan. La judoj tuj akceptis dividi la landon en du ŝtatojn, sed la araboj rifuzis. Anstataŭ ekkonstrui sian Palestinon ili komencis pafi, kaj la ceterajn okazintaĵojn ĉiu el vi konas ...

Por ke la legantoj komprenu min pli bone, jen vera rakonto. En la komenco de la 20a jarcento Ĥajim Weizmann, fama cionisma gvidanto, multe klopodis ĉe la lokaj politikistoj por aki-

ri en Londono subtenon al la cionisma projekto. Demandis lin unu el la membroj de la Ĉambro de Lordoj: „Kial vi, judoj, insistas setli ĝuste en Palestino? Ĉu vi ne povas trovi pli oportunan lokon por krei vian ŝtaton?” Respondis Weizmann: „Tio estas sama, kiel se vi demandus min, kial mi veturis 20 mejlojn por viziti mian maljunan patrinon, dum en mia kvartalo loĝas kelkaj maljunaj virinoj viziteblaj ...”

Josef ŠEMER
Israelo

Israelo 60-jara (4)

Babilonio civilizis la praaĵn hebreeojn, tamen judoj, kun geta menso, restas ĉe mitoj kaj memgrandiozigo. Per la lasta holokaŭsto oni ne volis murdi ĉiujn judojn. Per la postvivintoj Okcidento kreis Israelon, ne pro promeso en libro, sed kiel „postenon en fremda kulturo” (International Herald Tribune). Oni rabis hejmlandon, kiun Josef Šemer nomas „loĝejoj”, kaj forpelis ties popolon. Tial neniam estis paco dum la lastaj 60 jaroj. Demokratio kaj rasismo ne estas ĝemeloj. Israelo restas vasaĵo de Vaŝingtono, kiu detruas Irakon kaj nun preparas Israelon por bategi Iranon. La nocio pri „lerta judo” estas superstiĉo, kiu ne savas Israelon de konstanta timo. Necesas vera kuraĝo – posedata ekzemple de Hizbullah fronte al Israelo – por ke ĉi tiu liberiĝo de sia mastro. Tiam – eble pro profeteca miraklo – cionismo fine konfesos siajn krimojn kaj pentopagos al siaj viktimoj, por ke Israelo proksimiĝu al paco.

Husejn AL-AMILY
Britio

Israelo 60-jara (5)

Mi miras, ke neniuj menciis la opinion de Zamenhof en la reagoj pri la israela konflikto (MONATO 2008/7, p. 10-11). Li ja estis judo, sed rezignis pri cionismo. Sed li malpravus pri la revivigo de juda lingvo, la hebrea. Per la revivigita lingvo estis kreita la nova israela ŝtato. Bedaŭrinde ne estis kreita ŝtato por esperantistoj.

Dieter ROOKE
Svislando

Necesas energio

de Stefan MAUL

Okcidenta Eŭropo forte dependas de energi-importado el Rusio, kiu liveradas nafton kaj gason kaj tiel konsiderinde riĉiĝis dum la pasintaj jardekoj kaj tial ankaŭ de nove fariĝis grava mondpotenco. Sed en Eŭropa Unio (EU) oni jam plurfoje timis, laste okaze de la konflikto inter Kartvelio kaj Rusio, ke tiu dependeco povus kaŭzi gravan mankon de energio, se Rusio interrompus sian liveradon pro politikaj motivoj (kion ĝi fojfoje jam faris). Krome ja estas konate, ke la rezervoj de nafto kaj tergaso iam elĉerpiĝos. Jen do du gravaj kialoj, serĉi alternativan solvon por haviĝi ankaŭ estonte al EU la bezonatan energion. Sed ŝajnas, ke tion ĝis nun ne vere komprenas la potenculoj de EU.

Pliaj atomcentraloj?

Kiam draste plikostiĝis nafto kaj tergaso dum la pasintaj jaroj, en EU oni ne diris, ke nun necesas akceli alternativajn energifontojn, sed iuj simple kaj stulte argumentis, ke do necesas konstrui pliajn atomcentralojn, neglektante la gigantan danĝeron, kiu troviĝas en tiu energifonto. Kontraste renovigeblaj energioj enhavas neniam verajn riskojn. Eŭropo disponas pri ĉiuj formoj de renovigeblaj energioj, per kiuj oni povas produkti elektron kaj varmon: vento, riveroj, suno, tervarmo, maronda forto, biomaso. Ili povas – ne nepre en ĉiu lando kaj ĉiu regiono – esti evoluigataj kaj uzataj. Sed ĝis nun EU uzas nur iom pli ol dekonon el la disponebla fontaro por produkti elektron. Nur akvoforton oni elĉerpas jam je 60 elcentoj.

Certe, iuj el la instalaĵoj por generi alternativan energion ne estas aparte belaj. Ventogeneratoroj kun



Oni devas atenti, ke ventogeneratoroj ne detruu pejzaĝajn idiliojn

siaj gigantaj fostoĵoj kaj grandegaj aloj ne havas la ĉarmon de nederlandaj ventmueliloj. Tial ne malofte najbaraj loĝantoj protestas kontraŭ tiuj grandegaj dinamomaŝinoj, ĉar ili ĝenas belajn pejzaĝojn (krome bruas). Simile paneloj por generi varmon aŭ elektron el sunenergio sur tegmentoj kaj sur vastaj kampoj ne estas tiel belaj kiel koloraj tegoloj kaj maizokampoj. Sed ĉu atomcentraloj kun siaj monstraj vaporturoj estas pli belaj? Oni simple devas atenti, ke ventogeneratoroj kaj sunpaneloj ne detruu pejzaĝajn idiliojn, sed adaptiĝu al taŭgaj terenoj. Ekzemple oni planas en maldense loĝata regiono de Rumanio instaligi 2010 ventogeneratorojn, kiuj produktos 600 megavatojn. Sendube tio ne eblas en turista regiono.

Scienca takso

Ignorantoj ofte asertas, ke neniam eblos anstataŭi nafton, tergason kaj atomenergion per la supre nomitaj alternativaj (nomataj ankaŭ „verdaj“) energifontoj. Sed nun germana federacia ministrejo pri mediprotektado komisiis Germanan Centron por Avio-kaj Spaco-Vojaĝado esplori detalan takson por generado de verda elektro inkluzive de regiona disdivido. La rezulto de tiu scienca takso por EU kaj najbaraj landoj estas evidenta: la ekonomie generebla kvanto estas kun pli ol 5700 teravathoroj multe pli granda ol la hodiaŭa konsumado de 3700 teravathoroj aŭ la bezono prognozata por la estonteco. (Unu teravathoro egalas

al unu miliardo da kilovathoroj.) EU kaj entute Eŭropo do nediskuteble povus produkti sian kompletan bezonon per alternativaj energioj.

Cetere necesas (kaj eblas) por realigi tion, ke tiuj landoj, kiuj facile povas generi tiun aŭ alian energion, eksportu troan elektron al aliaj landoj. Hispanio ekzemple povus eksporti tiom da energio, ke ĝi kontentigus pli ol trionon de la bezono en EU. Aŭ Norvegio, kiu jam nun kovras sian kompletan energibezonon el renovigeblaj fontoj, povus produkti pli ol duoble tiom da verda elektro ol ĝi mem bezonas.

Konvinka programo

Sed kion faras EU? Ĝi ekzemple disponigas por la jaroj 2007 ĝis 2011 jare 550 milionojn da eŭroj por esplorado de nuklea energio. Kaj por evoluigo kaj konstruado de fuzioreaktoro lter EU pasintjare fondis komunan entreprenon por la daŭro de 35 jaroj kun subvencio de 7,6 miliardoj da eŭroj el la EU-buĝeto. Estas urĝa tempo, fondi similan programon por renovigeblaj energioj, kiu povus utiligi la regionajn fontojn en tuteŭropa reto. En EU oni ofte plendas, ke mankas komuna konkreta celo, kiu vere interesas homojn simile kiel tiutempe kreado de komuna valuto. Post enkonduko de eŭro jen la renovigebla energio certe denove povus konvinki EU-civitanojn pri valoro de la komuna organizaĵo. Necesas nur iom da energio por tiu estonta energio ... ■

INTERNACIAJ RILATOJ

Novaj hejmoj por drako kaj urso

MATTIANDU

Teritoria disputo inter Rusio kaj Ĉinio, kiu daŭris 40 jarojn, fine solviĝis. La du ministroj pri ekster-

landaj aferoj, respektive Sergej Lavrov kaj Yang Jiechi, subskribis en Pekino interkonsenton, kiu ĝustigas la limon

inter la landoj. Tiel ili donos impulson al bonaj najbaraj rilatoj inter la du ŝtatoj kaj al ekonomia kunlaboro.

Laŭ la interkonsento Ĉinio ricevas la insulon Tarabarov kaj parton de la insulo Bolŝoj Usurijskij. Ambaŭ insuloj situas meze de la rivero Amuro apud la urbo Ĥabarovsk. Ekde nun la insulo Tarabarov nomiĝos Yinlong Dao, ĉine „Insulo de la Arĝenta Drako”. La okcidenta parto de la insulo Bolŝoj Ussurijskij ĉine nomiĝos Heixiazhi Dao, aŭ „Insulo de la Nigra Urso”.

La unua konsento pri la interŝtata limo inter Rusio kaj Ĉinio estis subskribita en 1991. Tiam estis ĝustigitaj 98 % de la longeco de la limo. Interkonsenton pri la restintaj 2 % oni subskribis nur en 2004.

Sergeo JURJĈ

BALKANIO

Memorante miton

La 28an de junio centoj da serboj vizitis denove la monumenton Gazimestan apud Prištino, la ĉefurbo de Kosovo. Tie, samtage en 1389, okazis granda batalo inter unuiĝintaj balkanaj armeoj (serbaj, albanaj, hungaraj, bosniaj, bulgaraj ktp) kaj otomanaj fortoj. En la batalo mortis kaj la serba princo Lazaro kaj la otomana sultano Murat, tamen finfine venkis la otomanoj. Sekvis 500-jara jugo de Balkanio fare de la otomana imperio.

Malgraŭ kompleta malvenko ankaŭ de serboj, ĉi lastaj, tute strange, konsideras la tagon sankta kaj glora. Des pli ili ne komprenas, ke temas pri komuna batalo de balkanaj popoloj, ne nur serboj, kiuj eĉ malplimultis en la batalo. Ĉiujare ili marŝas amase al Gazimestan, por festi „venkon”.

Strange estas, ke venas serboj ankaŭ

nun, kiam Kosovo estas sendependa de Serbio kaj propraŝtate ekzistas. Tamen ili venadas, instigite de politikistoj radikalaj en Beogrado. La kosova polico ne malhelpis ilin kaj zorgis nur pri sekureco. Albanoj montris sin denove prudentaj kaj paciencaj.

La antaŭan tagon serboj de la norda parto de Mitrovica aranĝis antaŭanoncitan kunvenon por starigi propran parlamenton, paralelan al tiu elektita en 2007 en Kosovo. Kvankam la parlamento estas malleĝa kaj ne kapablas influi enlandan politikon, albanoj kaj internaciaj instancoj en Kosovo konsideras ĝin alia provo de la flanko de serbaj ekstremistoj. Tiuj deziras nek agnoski realecon, nek kunlabori por rekonstrui la plej novan, ankoraŭ malfortan, ŝtaton de Eŭropo.

Bardhyl SELIMI

GAZETARO

Ĵurnalisto arestita

Antaŭ nelonge la Haga Tribunallo kontraŭ krimuloj en eksa Jugoslavio arestigis portempe la kosovan ĵurnaliston Baton Haxhiu, direktoro de la tagĵurnalo *Ekspres*. Oni akuzis lin pri diskonigo de la nomo de unu el la atestantoj en la proceso de Ramush Hajradinaj, eksa ĉefministro de Kosovo, kiun fakte la tribunalo deklaris finfine senkulpa.

La prokuroro postulis, ke Haxhiu pagu monpunon de 15 000 eŭroj, por ke ne plu estu publikigitaj faktoj, kiuj kompromitus la laboron de la tribunalo. La gazetaro en Albanio kaj Kosovo protestis, dirante, ke ĵurnalisto ne bezonu gardi la sekretojn de tribunalo.

Bardhyl SELIMI

FUMADO

Tabako tabua

LOCATOR

La aŭstra parlamento akceptis severan leĝon kontraŭ fumado en restoracioj. La leĝo postulas limigitajn

zonojn por fumantoj. Nur en establoj kun areo ĝis maksimume 50 m² la estro libere povas decidi, ĉu li permesas fumadon.

En restoracioj kun areo inter 50 kaj 80 m² la kompetenta aŭtoritato devas prijuĝi, ĉu divido de la ejo je fumanta kaj nefumanta zonoj eblas konforme al la protekto de monumentoj. Ĉe pli grandaj restoracioj estas devige disponigi preskribitan zonan por fumantoj, se la restoraciestro entute permesas la nikotinguon. Ejoj, en kiuj oni rajtas fumi, devas havi sur bone videbla loko averton: „Fumado minacas vian sanon kaj sanon de viaj kunuloj.”

Labor-kontraktoj

Krome la leĝo kontraŭ fumado enhavas apartajn paragrafojn por protekti en restoracioj laboristojn, aparte junulojn kaj patrinigontojn. Tiuj ne devas labori en ejoj, en kiuj ili enspiras tabakfumon. Krome, oni devas fiksi en labor-kontraktoj, ke tiu rajtas ricevi kompenson, kiu rompas sian dungorilaton pro pasiva fumado.

Restoraciestroj, kiuj nealkonformiĝas al la leĝo, riskas monpunojn ĝis 2000 eŭroj kaj, okaze de recidivo, 10 000 eŭroj. Kontraŭagentaj gastoj povas ricevi monpunojn inter 100 kaj 1000 eŭroj. La leĝo kontraŭ fumado ekvalidos la 1an de januaro 2009, kaj transira periodo por rekonstrui restoraciojn daŭros ĝis la mezo de 2010.

Evgeni GEORGIEV

KOMUNIKADO

Ho, ve ...

Tagmeze, la 28an de majo, kuirante tagmanĝon, mi aŭskultis radio-raportojn kaj mi vere amuziĝis. Raportaĵo pri internacia futbal-matĉo el nia ĉefurbo Prago, ne la rezulton sciigis, sed priparolis honton de nia flanko kaj ofendon al gasta grupo el Litovio.

Oni preparis fotojn de latvaj futbalistoj anstataŭ de litovaj, hisis flagon latvan kaj ludis himnon latvan. El la radio mi aŭdis litovan parolanton, kiu tre



kolere ruse protestis kaj deklaris la kul-pantojn stultuloj, kiuj certe ne finis sian edukon pro stulteco.

La rusan mi bone komprenas. La parolo vere estis akra, sed la posta parolanto klarigis, ke la dokumentoj kaj informoj estas faritaj per traduko el la

angla. La eraro naskiĝis ĉe la traduko, krome tiaj eraroj onidire eĉ je internacia nivelo okazadas. Oni verŝajne ankoraŭ interkonsiliĝos, kiel peti pardonon.

Cetere la litovoj malvenkis ... en du sencoj.

Jindřiška DRAHOTOVÁ

LITOVIO

Vivi malpli longe



En la grupo 20-64-jaraĝa morteco en Litovio estas unu el la plej altaj en Eŭropo.



Laŭ spertuloj la situacio ne pliboniĝos, ĝis oni limigos alkoholkonsumon kaj fumadon kaj manĝos pli racie.

Litovoj vivas dek jarojn malpli ol eŭropanoj ĝenerale, kaj litovinoj kvar jarojn malpli. En la grupo 20-64-jaraĝa morteco en Litovio estas unu el la plej altaj en Eŭropo. La vivolongo de litovaj viroj eĉ postrestas je tri jaroj tiun de viroj en landoj, kiuj eniris Eŭropan Union kun Litovio. Virina vivolongo superas je 0,3 jaroj la EUnovulojn. La memmortiga kvoto estas preskaŭ la plej granda en EU.

Kronikaj malsanoj

Laŭ spertuloj la situacio ne pliboniĝos, ĝis oni limigos alkoholkonsumon kaj fumadon kaj manĝos pli racie. Ĉio ĉi ligiĝas kun kronikaj malsanoj kaj kancero. La sekretario de la ministrejo pri sanprotektado opinias: „Necesas instrui, ke sano estas pli grava, ol homoj imagas.”

Samtempe kuracistoj ĝojas, ke inter litovinoj mortoj pro malsanoj, kiujn kaŭzas tabako, estas unu el la plej malaltaj en Eŭropo. Bone efikis limigoj de tabaka reklamo.

LAST

FAMILIOJ

Kvinopa sukceso

Rimarkinda estas la sorto de ĝemelo-kvinopo naskiĝinta en Bulgario en malriĉa romaa ortodoks-kristana familio. La ĝemeloj – tri knabinoj, du knaboj, kiuj eniris la mondon en 1987 – ne similas unu al la aliaj, tamen ili same sin vestas.

Dum 21 jaroj ili malofte disiĝis. Inter ili ekzistas nerompebla ligo. Notindas, ke la patrino – lernejo-purigistino, kiu monate enspezas ĉirkaŭ 90 eŭrojn – tamen sukcese edukis ilin ne ŝteli aŭ mensogi (malvirtoj laŭdire karakterizaj por malriĉaj romaa familioj).

Helpis la familion la vic-direktorino de la lernejo, kie laboras la patrino, tiel ke la ĝemeloj finis la mezlernejon kun la intenco plu studi ĉe supera lernejo. La kvinopo perlaboris monon por aĉeti balvestaĵojn por celebri sian mezlernejan sukceson.

Dimitar HAĜIEV

HOMOJ

Saĝa decido



Jaroslav la Saĝa

Charles de Gaulle.

Jam en pli ol 15 landoj homoj elektis siajn plej popularajn civitanojn. Usonanoj elektis iaman prezidanton Ronald Reagan; britoj iaman ĉefministron Winston Churchill; francoj iaman prezidanton

Nun en Ukrainio, post longa balotado, kiun partoprenis preskaŭ du milionoj da civitanoj, estas nomumita duko, eminenta ŝtatgvidinto Jaroslav la Saĝa. Danke al li „*Kijiva Rusj*” (kieva Rusio) iĝis siatempe potenca eŭropa ŝtato. Ricevis Jaroslav 40 % de la voĉoj.

Dmitrij ĈIBULEVSKIJ

Leciono pri korupto

En la somero de 2006 Ninomija Masahito, tiam respondeca pri instruisto-ekzamenoj en la gubernio Ooita, kaj nun estro de la instruista komitato de la urbo Yufu, montris nomojn de dek homoj al Etoo Kacujoŝi, sekretario de element- kaj mez-lerneja fako. Ninomija ordonis al Etoo, ke tiu sukcesigu la dek kandidatojn en ekzameno okazinta en julio. Etoo obeis, kaj ĉiu ekzamenito sukcesis.

Komence de julio 2008 la polico arestis Etoo (52-jara) kaj Ninomija (61-jara), suspektante, ke ili ricevis po milionon da enoj de la patro de unu el la dek ekzamenitoj kontraŭ falsado de la rezultoj. Jen kredeble la unua fojo, ke korupto tia estas malkaŝita. Tamen laŭ onidiroj, probable vero, okazas jam de jaroj aferoj tiaj.

Por fariĝi instruisto en publikaj lernejoj, kandidato ricevu kvalifikon pri instruado en sia universitato, akirinte plejparte altajn notojn en la lernobjektoj.

Post la universitato, se oni volas fariĝi instruisto, nepras ekzameniĝi en la gubernio, kie oni volas labori. Kandidato sukcesu en la ekzameno.

Parlamentano

Tamen tiom multaj volas fariĝi instruistoj, ke estas malfacile sukcesi. Ekzemple, en tiu urbo Yufu, 481 homoj ekzameniĝis, kaj nur 41 estis akceptitaj de la instruista komitato. Diligente lerni ne sufiĉas, kaj kelkaj kandidatoj, pli precize la gepatroj, turnas sin al maljustaj manieroj. Fojfoje ili petas peradon de parlamentano ĉe la instruista komitato, memevidente kontraŭ pago.

Notindas, ke infanoj de aktivistoj en la sindikata movado neniam estas akceptitaj (mi kaj mia edzino estis aktivuloj: tial miaj gefiloj dekomence rezignis iĝi instruistoj). Tiamaniere familianoj de malriĉuloj kaj maldekstremuloj, kiuj aŭ ne povas aŭ rifuzas pagi koruptaĵojn, ne

fariĝas instruistoj.

Ankaŭ por fariĝi lernejestro, parlamentanoj havas grandan influon en la lasta ŝtupo. Tamen antaŭ tio, ambiciaj instruistoj dekomence dum multaj jaroj flatu siajn superulojn. Karieristoj tiaj ne apartenas al la instruista sindikato, laboregante humile kaj sindone por la superuloj. En instruistaj kunsidoj, ili ĉiam subtenas la lernejestron, kiu disdonas postenojn laŭ la lojaleco.

Lernejestro

Eble post 20 jaroj tiu havos eblecon ekzameniĝi pri posteno de vic-lernejestro, tamen nur kun lernejstra rekomendo. Kiam oni volas fariĝi lernejestro, perado de konservativa parlamentano povas pozitive influi – kontraŭ transdono de laŭa sumo. Tiam la parlamentano rekomendas la kandidaton al la instruista komitato.

Mi estis instruisto kaj aktivisto de la sindikato. Kiam mi eklaboris kiel instruisto en la 1960aj jaroj, laboris multaj honestaj kaj estimataj lernejestroj. Poste aperis pli kaj pli da neestimindaj lernejestroj. Mi do konkludas, ke ju pli malkapablaj estas instruistoj, des pli ili volas fariĝi lernejestroj kaj fakte ja fariĝas.

Torturo

Foje malkapabla instruisto sentas premojn en la klasĉambro: tiu ne povas bone instrui, kaj lernejoj primokas kaj malrespektas. La plej bona rimedo eskapi torturon tian estas fariĝi lernejestro: tiam oni ricevas estimon de eksteruloj, pli altan salajron, kaj ne devas instrui.

Tamen eĉ kiel lernejestro, nepras flati. Tial estroj blinde sekvas la ordonojn de la instruista komitato kaj la ministrejo pri instruado. Subpremante kapablajn instruistojn, ili diras al lernejoj, ke necesas en la vivo honesti. Tiuj tamen flaras hipokriton kaj mensogojn.

Necesas purigi la japanan instruan mondon. Japanio tamen ĉiufanke malpuras, do ne eblas purigi nur la instruadon.

HORI Jasuo



TEKNIKO

Inteligenta poŝamiko

La 11an de julio en pluraj urboj de Eŭropo staris vicoj antaŭ vendejoj, kelkfoje eĉ la nokton antaŭe. Ĉie pluraj dekoj da emuloj atendadis por povi aĉeti sian ekzempleron de iPhone 3G, la plej freŝa produkto de Apple. Kio estas iPhone 3G, kaj ĉu vere valoras vicostari por povi akiri ĝin? Monato testis la aparateton kaj raportas.

iPhone 3G estas tiel nomata persona cifereca asistilo, malgranda poŝkomputileto, kiu povas igi vian vivon pli facila kaj agrabla. Vi povas per ĝi telefoni, krozi en Interreto, kontroli vian retpoŝton, sendi tekstomesaĝojn (SMS), ekscii, ĉu hodiaŭ pluvos aŭ ne, trovi la plej rektan vojon al iu ajn adreso en la mondo, kontroli vian agendon, aŭskulti vian ŝatatan muzikon, rigardi filmojn, kaj kaj kaj. La ebloj ŝajnas esti senfinaj.

Inteligenta adresaro

Tre praktika por la ĉiutaga vivo estas la adresaro. Ĝi montras kompreneble adresojn, telefonnumerojn kaj retadresojn kaj vi povas aldoni ĉiujn deziratajn informojn. Sed se per la fingro vi tuŝas retadreson, aŭtomate malfirmiĝos la retpoŝta programo kaj ĝi montros fenestron, en kiu eblos tuj tajpi retmesaĝon. La adreso de la alskriboto kaj via adreso kompreneble jam estos indikitaj. Se per la fingro vi tuŝas telefonnumeron, aŭtomate la persono estas vokata. Se per la fingro vi indikas stratadreson, tuj malfirmiĝos mapo de la regiono, kie la persono vivas kaj ruĝa pinglo indikos la domon. Se hazarde vi volas scii, kiom for loĝas tiu persono, aŭ laŭ kiu vojo vi veturu por atingi la loĝejon, vi tuŝu la ekranon denove, kaj tuj vi vidos la tutan itineron. La aparateto ja havas ankaŭ bi-



Ĉie pluraj dekoj da emuloj atendadis por povi aĉeti sian ekzempleron de iPhone 3G, la plej freŝa produkto de Apple.

rilon en si, kaj do ĉiam scias, kie vi estas en ajna momento.

Monato en la poŝo

La aparateto ebligas retumi kiam ajn kaj kie ajn per la makintoŝa krozo *Safari*. Kompreneble, la granda ekrano de tekokomputilo aŭ de tabla komputilo estas pli facila. Sed se vi sidas en tramo, kaj volas mallonge ion kontroli en Interreto, granda komputilo ne estas havebla, kaj tiam *iPhone* 3G tre bone helpas vin. La ekraneto estas 5 cm larĝa kaj 8 cm alta (aŭ 8 cm larĝa kaj 5 cm alta, ĉar oni povas laŭplaĉe teni ĝin horizontala aŭ vertikala). Kiam oni atingas kutiman retpaĝon, oni devos iom zomi en la paĝo por povi ĉion bone vidi, sed pli kaj pli da retpaĝoj, ekzemple tiuj de Google, scias, ke vi uzas poŝkomputilon kaj aŭtomate montras al vi adaptitan version, kiu estas perfekte legebla sen aparta zomado.

Ĉu vi forgesis vian ekzempleron de MONATO en la hejmo, kaj tamen ŝatus legi ĝin nun? Ene de kelkaj sekundoj via *iPhone* montros ĝin al vi, kaj vi povos legi ĝin (la servo estas senpaga por MONATO-abonantoj; necesas nur peti ĝin). Kaj vi volus reagi al artikolo? Kelkaj

klavtuŝoj sufiĉas, kaj vi retpoŝtas al la redakcio!

La aparato rekonas la plej diversajn sistemojn. Se vi estas en hotelo aŭ restoracio, kie estas WiFi-konekto, ĝi tuj uzos ĝin. Se en via hejmo vi havas sendratan reton, ĝi kaptos ĝin tuj, kaj uzos ĝin. Se vi forlasos la domon, kie ne plu estas retkonekto, ĝi ŝaltos aŭtomate al la sistemo EDGE aŭ 3G, depende de tio, kion liveras via telefonkompanio.

Ludilo

Se vi ŝatas de tempo al tempo ludi, ne mankos al vi ebloj. *iPhone* 3G estas iasence posteulo de *iPod*. Do klaras, ke ĝi perfekte taŭgas por aŭskulti vian preferatan muzikon, viajn aŭdlibrojn aŭ por spekti filmojn. Ludilojn la baza versio ne havas, sed ene de kelkaj sekundoj vi povas elŝuti popularajn kaj malpli popularajn programojn, kiel ekzemple Sudokon, la ludon Turoj de Hanojo kaj similajn.

Oficeja ilaro

Kontraste al la produktoj de *Microsoft*, *iPhone* 3G ne havas tekstoprilabo-



Simpla tuŝo de iu ajn adreso tuj aperigas la lokon sur la mapo de la regiono, en kiu eblas zomi laŭplaĉe.



Vidi la plej freŝan numeron de Monato en iPhone 3G...

ran programon kiel *Word*, nek tabelprogramon kiel *Excel*. Ĝi tamen posedas iun bazan tekstoverkilon. Tekstojn vi do povas verki en la trajno kaj ekzemple de tie retpoŝte sendi al via hejmo aŭ oficejo por plua pritrakto. Legeblaj per *iPhone* estas dokumentoj, kiujn vi alŝutis al via



La birilo de iPhone 3G ektrovas, kie vi estas, kaj indikas la vojon al via destinaloko.

Google-spaco, nome dokumentoj kreitaj per *Word*, *Excel* kaj *OpenOffice.org*, sed vi ankoraŭ ne povas prilabori ilin. *Google* tamen informas, ke baldaŭ tiu eblo ekzistos. Ekde tiam *iPhone* do servos ankaŭ kiel oficeja ilaro.

iPhone estas liverita en la lingvo de via regiono kaj vi povas ŝalti al alia „grava” lingvo senprobleme. Esperanto bedaŭrinde ankoraŭ ne estas grava, kaj probable daŭros iom, ĝis volontuloj finverkos esperantlingvan interfacon por ĝi.

Bela kaj fortika

La aparato estas tre bela (ekzistas nun nigra kaj blanka versioj) kaj fortika.



Testoraportoj de sendependaj organizaĵoj montris, ke hazarda faligo kutime ne detruas ĝin. Aliflanke fluidaĵojn ĝi timas. Do ne faligu ĝin en sitelon da akvo, ĉar tio povus signifi la finon de via plezuro. La ekrano estas tute klara, eĉ sub tre lumaj cirkonstancoj. Se vi intensive uzas la aparaton, necesas reŝargi la baterion ĉiutage.

Malbonaj flankoj

Ne decus paroli nur pri la bonaj flankoj de la aparato. Ĝi certe havas kelkajn malavantaĝojn. Uzantoj, kiuj havas nur Linukson, kaj nenion alian, havos problemojn. Por aktualigi la sistemon, por fari savkopiojn, por alŝuti novajn programojn, vi bezonas komputilon kun XP aŭ Vista aŭ makintoŝan komputilon.

La nuna versio (ni testis version 2.0.1) ne havas la eblon kopii kaj glui, kio estas tiel praktika en la grandaj sistemoj. En la retpaĝo de Apple estas indikite, ke baldaŭ tiu eblo estos aldonita, sed ne estas indikite, kiom baldaŭ estas baldaŭ.

iPhone 3G estas ankaŭ fotilo, sed ĝia kvalito (2 milionoj da bildopunktoj) estas klare sub la kvalito, kiu nun estas kutima en poŝtelefonoj. Krome estas iom malfacile teni la aparaton fiksa, dum oni puŝas la ekigan butonon.

Ĉu vicostari aŭ atendi?

Resume, la aparato estas tre praktika helpilo por ĉiutaga uzo, sed iuj el ĝiaj ecoj bezonas ankoraŭ plibonigon. Tre supezeble tiuj plibonigoj iom post iom aldoniĝos. La ĉefa kaj ĉiama demando do estas: ĉu jam nun aĉeti ekzempleron, kaj ĝui tuj ĝiajn servojn, aŭ atendi unu jaron, kaj nur tiam ekĝui pli da servoj?

Paŭl PEERAERTS

La aparateto funkcias horizontale aŭ vertikale. La bildo aŭtomate adaptiĝas.

KRIMADO

Interŝtata murdo

KAPITAN KOSOLD



La belga kaj la nederlanda polico ĵus travivis iom nekutiman kunlaboron. Estis trovita mortigito en dormoĉambro, kiu troviĝas parte en la belga vilaĝeto Baarle-Hertog [barle hertoh], parte en la nederlanda municipo Baarle-Nassau [barle nasaŭ]. Kaj, la pinto de la problemo, eĉ la korpo unuavide kuŝis duone en Belgio, duone en Nederlando.

La ŝtata limo inter Nederlando kaj Belgio ofte pasas tra ĝardenoj kaj privataj domoj, sed malofte ĝi kaŭzas tiel komplikajn jurajn problemojn. Kial? Nu, imagu, ke la nederlanda polico traktas la kazon, kaj ke poste la advokato de la murdinto povas pruvi, ke la krimo okazis en Belgio. Tiam la murdinto probable estos liberigita „pro proceduraj eraroj”.

Termezuristoj

Nek la belga nek la nederlanda polico volis riski fari procedurajn erarojn, kaj pro tio estis venigitaj specialistaj termezuristoj el ambaŭ ŝtatoj, kiuj kune kaj kolege desegnis longan blankan landlimon en la fatala domo. Post tri tagoj da laboro estis decidite, ke fakte kaj science pruvite la korpo kuŝas en Nederlando. „En limregiono ni tre ofte devas konsulti la kolegojn de la alia lando,” diras Martine Pillaar

de la nederlanda krimpolico, „sed tiel komplikan kazon mi neniam spertis. Sed la sorto tamen estis iom niaflanke, ĉar finfine montriĝis, ke la mortinto estas plene en Nederlando, kaj ne en du ŝtatoj. Krome la ĉefa akuzito estas nederlandano.”

Kelkajn tagojn poste la gazetaro informis, ke la mortigito estis belorusa. Do eble la sorto tamen ne favoris la nederlandan policon per „facila kazo” ...

PAŬL PEERAERTS



La limo inter la belga Baarle-Hertog kaj la nederlanda Baarle-Nassau estas tre malregula, kaj eĉ pasas meze de privataj domoj. Sur la mapo la terpecoj kun N estas nederlanda teritorio ene de Belgio; la pecoj kun H estas belga teritorio ene de Nederlando.

ALBANIO

Lando sur- kaj sub-tera

Unu el la plej okulfrapaj objektoj, kiu kaptas la atenton de fremduloj en Albanio, estas araneaĵo de surteraj bunkroj, nombrantaj ĉirkaŭ 700 000, aŭ unu por ĉiu familio. Krome troveblas subsurfacaj bunkroj kaj tuneloj – rifuĝejoj por la armeo kaj por la loĝantaro. Ekzistas centmiloj da tiaj bunkroj, konstruitaj por kontraŭstarigi atakojn de imperiismaj kaj socialimperiismaj ŝtatoj (t.e. membroj unuflanke de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo, aliflanke de Varsovia Pakto). Belga ĵurnalo iam komentis, ke ekzistas du Albanioj: unu surtera, alia subtera.

Apartaj grupoj de bunkroj ekzistis en ĉiu granda urbo por la gvidantaro. Tuta sistemo de tuneloj kaj apartamentoj troviĝis subtere en la tiel nomata bloko, alivorte la registaro-kvartalo de la ĉefurbo Tirano. De tie eblis atingi subtere la Dajt-monton, apud Tirano, aŭ luksajn apartamentojn en la Skrapar-montaro, sud-oriente de la lando.

Lastatempe oni malkovris tutan kvartalon subteran en la urbo Gjirokaŝter, kie naskiĝis Enver Hoxha [hodĵa], la eksa albana komunista diktatoro. La tunelaro konsistas el kvar koridoroj 800 m longaj. Ambaŭflanke de la koridoroj estas pli ol 100 ĉambroj, inkluzive de necesejoj, duŝejoj, ankaŭ ludejoj kaj amuzejoj. La loka registaro intencas malfermi la tunelo-kvartalon al la publiko kaj tiel krei muzeon.

Bardhyl SELIMI

VATIKANO

La kontoj de Vatikano kaj de la Sankta Seĝo

En 2007 la ekonomia bilanco de la Sankta Seĝo – koncerne la sferojn instituciajn, financajn, nemoveblaĵajn kaj amaskomunikilajn – fermiĝis kun defcito de proksimume 9 milionoj da eŭroj, post tri jaroj de pozitivaj rezultoj. La komunika dokumento de Vatikano rimarkigis, ke pezis sur la fina bilanco precipe la tendenco de financa sektoro, interalie la kurzofalo de la usona dolaro.

En la sektoro de instituciaj agadoj – la Vatikana Radio, la Vatikana Tipografio, la ĵurnalo *L'Osservatore Romano*, la Eldonejo kaj Librejo kaj la Vatikana Televida Centro – registriĝis

negativa saldo de 14,6 milionoj da eŭroj, ŝuldata precipe al la Vatikana Radio kaj al *L'Osservatore Romano*, dum la sektoroj televido kaj tipografio havis pozitivajn rezultojn. Pozitivas ankaŭ la



KOTICOTO

enspezoj de la vaticanaj muzeoj, precipe pro la plimultiĝo de vizitantoj (en 2007 4,5 milionoj da pagintoj).

Al la „Obolo de Sankta Petro”, konsistanta el la oferoj destinitaj helpi la paŝon en liaj misioj apostola kaj monasista, fluis 79 milionoj da usonaj dolaroj.

Armando ZECCHIN



FRANCIO

Ŝtelo iĝas kutimo

Estis kalkulite, ke en la jaro 2007 la kosto de ŝteloj en grandaj ĉiovendejoj atingis 4,6 miliardojn da eŭroj, tio estas 200 eŭrojn jare por ĉiu familio!

Multaj preterkonsideras la biskvitojn, kiujn infanoj aŭ patrinoj prenas se ili malsatas dum la aĉetado, aŭ trinkaĵojn, aŭ bonbonojn, ĉar „tio ne estas ŝtelo, tio estas bagatelaĵo”. Evidente la franca proverbo „kiu ŝtelas ovon, ŝtelas bovon” ne plu aktualas! Profesiuloj scias, ke 1,3 % de la vendista profito estas forrabita; ekzemple ĉe *Leclerc* [leklér] la profito estas 3-4 %.

Kio malaperas? Ne necesaj manĝaĵoj aŭ nepraĵoj, eĉ se de tempo al tempo ĉeftitoloj de gazetoj konsternas kaj protestas pro arestado de patrino, kiu ŝtelis por nutri siajn infanojn. Ne, malaperas aĵoj kun tre videbla nomo de fama firmao; ekzemple ŝminkaĵoj, vestaĵoj, sakoj, aŭdvida aŭ sona materialo. Ju pli granda la vendejo, des pli grandaj la ŝteloj. Malgraŭ gardistoj kaj kameraoj

aŭ alimaniere kontrolado malfacilas tion eviti. La perdo koncernas ne la produktintojn kaj fabrikintojn, kiuj fojfoje gajnas 40 %, ĉar ĉiuokaze ili estis jam pagitaj, sed suferas la ĉiovendisto.

Kion fari? Se la aĵo estas tro ofte ŝtelita, eblas protekti ĝin, ekzemple metante ĝin en ŝrankon. Sed tiam oni konstatas, ke ĝi ne plu vendiĝas, ĉar aĉetanto kutimas memservi sin kaj ne pretas alvoki vendiston por malfermi la ŝrankon. Protekteblo ŝajnas esti nevidebla kontraŭŝtela protektilo, enmetita de la produktanto mem dum la fabrikado aŭ enpakado kaj detektebla ĉe la kaso aŭ la foriro. Tiu solvo kontentigus ankaŭ asociojn pri homaj rajtoj, kiuj regule protestas kontraŭ spionado per kameraoj.

Renée TRIOLLE

ALBANIO

Ankaŭ eksterlandanoj aĉetas domojn

Post la jaro 1990 Albanio altiris intereson de eksterlandanoj, kiuj volis aĉeti nemoveblaĵojn, interalie apartamentojn. Tion ebligis la novaj leĝoj, la bona kvalito de la konstruaĵoj, la relative malaltaj prezoj kaj nelaste la bona mediteranea klimato de la lando.

Lastatempe la brita peranta kompanio *Barrasford & Bird*, kun oficejoj en Bulgario kaj Grekio, proponas apartamentojn ankaŭ en Tirano kaj ĉe la marbordo. La prezoj komenciĝas de 61 000 eŭroj por apartamento kun unu ĉambro kaj kuirejo, 76 000 eŭroj por du ĉambroj kaj kuirejo kaj 120 000 eŭroj por tri ĉambroj kaj kuirejo. Apartamento ĉe la marbordo de Shëngjin kostas minimume 40 000 eŭrojn. Ĝenerale apartamentoj ĉe la marbordo kun areo de 100

kvadrataj metroj kostas 75 000 eŭrojn, dum tiuj apud Tirano kostas 1200 eŭrojn por kvadrata metro.

La interesantoj estas kutime homoj havintaj brilan karieron kaj dezirantaj pasigi la restantan vivoperiodon en landoj kun bona klimato kaj relative malaltaj prezoj, kie ilia pensio larĝe sufiĉas por ke ili povu sin vivteni.

Antaŭe tiel agis germanoj en i.a. Hispanio kaj Egiptio. Poste oni preferis landojn kiel Rumanio, Bulgario kaj Kro-

atio. En Hungario kaj Rumanio, antaŭ ol tiuj landoj eniris en Eŭropan Union, la prezoj de la apartamentoj laŭleĝe plurestis malaltnivelaj, poste ankaŭ tie ili liberiĝis kaj altiĝis.

Montenegro havas malsaman klientaron

Montenegro allogis ĉefe rusojn, kiuj aĉetis terenojn kaj domojn eĉ en relative izolitaj lokoj. „Frenezaj rusoj pretas aĉeti ĉion ĉe ni, tiel plialtigante relative multe la prezojn, neelteneblajn jam por la ordinara loĝanto”, diris iu montenegrano. Tiel en Podgorica la prezo por kvadrata metro atingis du ĝis kvar mil eŭrojn.

Sama situacio estiĝas ankaŭ en Albanio. Laŭ la brita kompanio, la jara profitnormo estas minimume 11 %. Ĝia estro diras: „Ni estas ja la pioniroj de la merkato de nemoveblaĵoj en Bulgario kaj nun ankaŭ en Albanio!”

Bardhyl SELIMI

USONO

Nombro de militistaj invalidoj kreskas

Pli ol 4000 usonaj soldatoj mortis en Irako, sed la nombro de vunditaj soldatoj estas dekoble pli alta. Internaj dokumentoj de la Administracio por Veteranaj Aferoj taksas, ke la kosto pro militistaj invalidoj post 25 jaroj kreskos de nunaj 29 miliardoj da dolaroj ĝis 59 miliardoj.

Nun ankaŭ pli da maljunaj veteranoj suferas je malsanoj kaŭzitaj de militservo. Ju pli la veteranoj maljuniĝas, des pli ili petas monkompenson pro siaj militservaj malsanoj, kiuj pro la aĝo pligraviĝas. La nombro de invalidoj saltis je 25 % ekde 2001, ĝis 2,9 milionoj. Dum la ses jaroj antaŭ la militoj en Afganio kaj Irako, oni konsta-

tis pli modestan kreskon je 4 %.

Kvankam inflacio parte eksplikas la pli altan koston, ĝi ne estas la sola kialo. La ĉefa kaŭzo certe estas la plibonigo de la kuraca scienco. Antaŭ kelkaj jaroj la plimulto de la vunditoj mortintus, sed nuntempe ili postvivas multe pli gravajn vundojn, ekzemple membrojn amputitajn kaj traŭmatajn brulvundojn. Mensaj



NET EFFECT

malsanoj ankaŭ estas kompensataj. Krome la hodiaŭaj veteranoj pli konscias pri siaj rajtoj ol la veteranoj de antaŭaj militoj, kiuj ofte honte hezitis peti registaran helpon. El 755 000 veteranoj de Afganio kaj Irako 181 000 nun ricevas iun kompensagon.

Roland THIBAUT

Pli kaj pli da rubo al la tria mondo

La konvencio de Bazelo, kiu ekestis en 1989 kaj ekvalidis en 1992, havis kiel ĉefan celon eviti, ke la landoj de la tria mondo iĝu la amas-rubejo de toksaj forĵetaĵoj de la riĉa nordo. Bona intenco certe, sed la praktiko montras, ke intencoj ne ĉiam plene realiĝas.

Laŭ la usona *Basel Action Network* (www.ban.org) en la haveno de la niĝeria ĉefurbo Lagos ĉiumonate alvenas 500 konteneroj plenaj je forĵetitaj elektronikaj aparatoj, ĉefe komputiloj kaj malnovaj televidiloj. En 2007 la usonanoj aĉetis probable 30 milionojn da novaj televidiloj kaj forĵetis preskaŭ same multe da malnovaj aparatoj. Ili grandparte iris al Niĝerio, Barato kaj Ĉinio por „recikligo”, sed plej ofte recikligo tute ne okazas. La aparatoj venas sur grandajn rubmontojn. Klasika televidaparato povas enhavi ĝis kvar kilogramojn da plumbo, kiu iom post iom enpenetras en la teron. Oni taksas,

ke ĉi-momente ekzistas unu miliardo da privataj komputiloj en la mondo, ĉefe en la industriaj landoj, kaj ke en 2008 oni forĵetos 180 milionojn el ili.

Kvankam Usono subskribis la konvencion de Bazelo, ĝi ne ratifis ĝin. Ne ekzistas tie federacia leĝaro, kiu regulas la recikligon de elektronika rubo. Pro tio la organizaĵo *Electronics Takeback* (Reprenu elektronikaĵojn) lanĉis kampanjon, kiu celas stimuli la produktantojn libervole repreni la malnovajn elektronikajn aparatojn okaze de aĉeto de novaj. Laŭ niaj informoj nur la giganto *Sony* ĝis nun pretas transpreni malnovajn televidilojn. Cetere, estas ankaŭ *Sony*



DAVID SAG

Ericsson kaj *Sony*, kiuj aperas pinte en la listo de „verdaj” entreprenoj laŭ listo de *Greenpeace* (www.greenpeace.org/international/campaigns/toxics/electronics/how-the-companies-line-up). Tute fine en la ruĝa parto de la listo aperas *Nintendo*, *Microsoft*, *Siemens* kaj *Philips*.

En Eŭropa Unio (EU) la repreno de difektitaj aŭ malnovaj elektronikaj aparatoj iĝis deviga ekde la 13a de aŭgusto 2005 pro la direktivo 2002/96/EK pri elektra kaj elektronika rubo. Produktantoj kaj distribuantoj de elektraj kaj elektronikaj aparatoj devas proprakoste repreni ilin post finuzado kaj informi siajn klientojn pri tio. Tamen ankaŭ tie ĉi la nobla celo kaj la nigra realo diverĝas. La firmaoj ne rajtas sendi tiun rubon al la tria mondo, sed neniu leĝo malpermesas al ili malmultekoste vendi „brokantajn” aparatojn al Afriko kaj Azio por dua uzo. Cetere, la plimulto de la aparatoj ne estas reportita al la vendisto post uzado. Poŝtelefonoj, MP3-ludiloj kaj aliaj etaj aparatoj plej ofte estas ĵetitaj en rubsakon kaj atingas la rubforonon.

Kvin elcentoj de la eŭropa rubo konsistas nun el elektronika kaj elektra rubo, same multe do kiel plasta pakmaterialo, sed multe pli danĝera ol pakmaterialo, kaj tiu elcentaĵo ĉiujare kreskas. Sed ne nur en Eŭropo kaj Usono ekzistas tiu tendenco. En la venontaj du jaroj aldoniĝos 200 milionoj da komputiloj en la ĉinaj hejmoj, kaj Barato antaŭvidas en tiu periodo 80 milionojn da novaj uzantoj. Se oni konsideras la fakton, ke poŝtelefono kaj tekokomputilo havas mezuman vivodaŭron de 3-4 jaroj, la problemoj ĉiujare iĝos pli kaj pli giganta.

Paŭl PEERAERTS



PAŬL PEERAERTS

BULGARIO

Adiaŭo al la „dancantaj ursoj”



ZAPKIGOD

En Bulgario ekzistis longa tradicio en la trejnado de ursoj por danco. Rezulte de ĝi ekestis la metio de ursodresisto (bulgarlingve *meĉkar*), praktikata de romaoj. Tiu metio estis

ligita al ŝanĝo de la naturvivo de ursoj laŭ tre kruela metodo. Oni trejnus la ursidojn, por ke ili „dancu” sur varmega ferlato. Tiel ili estis devigataj salteti, do „danci” sub la sonoj de originala bul-

gara muzikilo *gadulko* (ribeko). En la fora pasinteco la ursodresistoj vagis tra la lando kaj dancigis siajn ursojn por perlabori monon. En la tempo de vigla internacia turismo la „dancantaj ursoj” fariĝis allogaj distraĵoj por eksterlandaj turistoj en la bulgaraj ripozejoj ĉe la Nigra Maro.

Tamen sekve de la agado de organizaĵo pri bestprotektado la „dancantaj ursoj” oni iom-post-iome translokiĝis al speciale establita parko en la ĉirkaŭaĵoj de urbo Belica (sud-okcidenta Bulgario), nomata Sava Centro. Ĝin fondis en la jaro 2000 kaj ekde tiam finansas la fondaĵo „Kvar piedegoj” de eksa franca aktorino Brigitte Bardot. La bulgara branĉo de la fondaĵo ekde 2000 laboras laŭ projekto „Parko por la dancantaj ursoj” kaj ĝis nun sukcesis doni ŝancon por nova vivo al eksaj dancantaj ursoj. Per la transigo de la lastaj tri dancantaj ursoj pasintjare la nombro de savitaj ursoj iĝis 25.

La unuaj loĝantoj de la parko venis aŭtune de 2000. Post sep jaroj tie ekloĝis ankaŭ la lastaj dancantaj ursoj. La tri lastajn bestojn bonvenigis Brigitte Aounoyan, reprezentantino de la fondaĵo „Kvar piedegoj”. Okazis solenaĵo, dum kiu la ĉeneroj sur la nazoj de la ursoj estis distranĉitaj. Tiel Bulgario adiaŭis la dancantajn ursojn.

La lastaj tri dancantaj ursoj estas Miŝo, Svetla kaj Mima. Ili vivis kune ekde la unuaj paŝoj en la menciita metio. Ĉiuj ili kiel ursidoj estis prenitaj de la familio Stanev el vilaĝo Gecovo, regiono de Razgrad (norda Bulgario) kaj trejnataj „danci” laŭ la ĉi-supre priskribita kruela metodo. Pro la erara nutrado kaj malbonaj kondiĉoj de bredado ili neniam havis antaŭe vintran dormon.

Ne estis facile por la posedantoj disigi de siaj bestoj. Ili estis konsiderataj anoj de la familio. La ursoj certigis perlaboron. Pro tio oni malrapide translokiĝis ĉiujn dancantajn ursojn. Ties loĝado en la parko por la dancantaj ursoj tamen kreis ankaŭ certajn problemojn en ilia adaptiĝo al la novaj vivkondiĉoj.

Dimitar HAĜIEV

La kornvala ne mortinta!

Kornvalo estas malgranda duklando kun areo de 3563 km², kiu situas sur duoninsulo ĉe la sud-okcidenta ekstremaĵo de Britio. Ĝi inkludas la insularon Scilly [sili], je distanco de 45 km de la ĉeflando, kaj la tuta teritorio havas 513 528 loĝantojn, el kiuj nur 32 % estas denaskaj kornvalanoj. La indiĝenoj ne rigardas sian etan landon kiel parton de Anglio kaj fieras pri sia kelta origino. Historie, Kornvalo estas unu el la restantaj keltaj landoj, kiuj konsistas el Irlando, Kimrio, Skotlando, la Manksa Insulo kaj Bretonio. (La galegoj de nord-okcidenta Hispanio ankaŭ rigardas sin kiel keltan popolon, kvankam ili ne plu parolas keltan lingvon.)

La kornvala lingvo apartenas al la britona grupo de la familio de keltaj lingvoj. Tiu grupo inkludas ankaŭ la kimran kaj la bretonan. La irlanda, skotgaela kaj manksa apartenas al la *gaela* lingvaro. Kvankam la britona familio kaj la gaela havas sufiĉe multan vortaron de komuna deveno (ankaŭ multe da radikoj troveblaj en la malaperinta gaŭla lingvo de Francio - vidu la verkon *La galla lingvo* de André Cherpillod), la du grupoj ne estas interkompreneblaj. La bretonoj estas posteuloj de kornvalanoj, kiuj transiris la maron en la 6a jarcento, kaj ilia hodiaŭa lingvo estas la plej proksima al la kornvala. Oni kalkulas, ke la kornvala dividas 80 % de sia baza vortaro kun la bretona, 75% kun la kimra, kaj 35 % kun la irlanda kaj skotgaela.

Oni kutimis aserti, ke la lasta flua parolanto de la kornvala estis iu virino, nome Dolly Pentreath [doli pentrit], kiu mortis en 1777, sed tio ne plu estas kredebla. Estas diversaj raportoj, ke ankoraŭ en 1875 troviĝis kelkaj parolantoj, kaj eĉ en 1906. La laste menciita estis virino nome Alison Tregenning, sed dum

ŝia vivo la revigligo de la lingvo jam progresis. Resume, ŝajnas, ke la lingvo neniam estis tute forgesita. La revivigo komenciĝis en la 19a jarcento precipe per la klopodoj de du elstaraj gvidantoj: Henry Jenner [henri ĝener] kaj Robert Morton Nance [nans]. En la fruaj jaroj de la 20a jarcento, Jenner eldonis lernolibron kun la titolo *A Handbook of the Cornish Language* (Manlibro de la kornvala lingvo). Sekvis lernolibro verkita de Nance: *Cornish for All* (Kornvala por ĉiuj) (1929), kaj *Lessons in Spoken Cornish* (Lecionoj en parola kornvala) de A. S. D. Smith (1931). La rezulto de tiuj klopodoj estis estiĝo de tiel nomata *Unuigita kornvala*. Kelkaj opiniis, ke tiu formo de la lingvo estas tro rigida kaj arkaika, do kreiĝis iom reformita formo nomita *Moderna kornvala*.

En 1986, la plimulto de la kornvalaj asocioj kaj instancoj adoptis normigitan formon, kiun oni nomis *Komuna kornvala*. Ĉar ĉiuj tiuj formoj temas pri la *skriba* lingvo, tiuj diferencoj tute ne malhelpas komunikon inter parolantoj de la kornvala. La plimulto de l' parolantoj devenas de la pli aĝa generacio, sed la lingvo nun estas instruata al infanoj en kelkaj unuagradaj kaj duagradaj lernejoj. En la printempo de 2008, oni taksis, ke 2000 homoj flue parolas la kornvalan, kaj kelkaj personoj sub la aĝo de 30 jaroj estas edukitaj kiel denaskaj parolantoj. Oni neniam povus supozi, ke la plimulto de l' loĝantoj en Kornvalo iam parolos la kornvalan anstataŭ, aŭ kune kun, la angla, sed unu el la plej gravaj britaj lingvistoj, nome David Crystal [dejvid kristal], opinias, ke restos malgranda, sed influhava minoritata komunumo, kiu konservos la lingvon.



Supozeble la lasta flua parolanto de la kornvala estis Dolly Pentreath.

Ne mortinta

Post nia mallonga restado en Kornvalo, ni povas konfirmi, ke la kornvala ne estas mortinta lingvo, kvankam ĉie oni aŭdas la anglan. Krom la fakto, ke la angla estas la ŝtata lingvo de Britio, miloj da turistoj vizitas Kornvalon dum la feria sezono, kaj multaj angloj hejmiĝis en la duklando pro ĝia milda klimato kaj belaj plaĝoj, do oni ne povas esperi ĉie renkonti multajn parolantojn de la kornvala. Tamen, la bopatro de nia nevo estas fervora apoganto de la lingvo kaj kulturo de Kornvalo. Ĉe la edziĝfestoj li fiere portis la kornvalan kilton – imitaĵo de la skota nacia vira vestaĵo, adoptita de kornvalaj patriotoj. En la ĉarma pitoreska vilaĝo Padstow [padsto] ni trovis librovendejon kun nomo en la kornvala lingvo, kaj tie ni aĉetis imponan novan kornvalan vortaron, *Gerlyver Kernewek Kemmyn* (Vortaro de komuna kornvala). En la biblioteko de la turisma urbo Newquay [niuki] (kornvale: Tewynn Pleustri), estis libroj en la kornvala kaj informa tuŝekrano, sur kiu oni povis trovi informojn en diversaj lingvoj, inkluzive de la kornvala. Do eĉ inter la oficialaj instancoj la kornvala estas rigardata kiel vivanta lingvo.

La 5an de novembro 2002 la brita registaro agnoskis la kornvalan kiel unu el la lingvoj inkludindaj laŭ parto 2 de la Eŭropa Ĉarto pri Regionaj kaj Malplimultaj Lingvoj, kaj deklaris, ke ĝi intencas registri ĉi tiun decidon ĉe la Konsilio de Eŭropo.

Garvan MAKAJ

Vulgato, Vulgatoj, Nova Vulgato

Kio estas la Vulgato (latine *Vulgata*), malfacile troveblas homo, kiu tion ne scias. Temas, fakte, pri la Biblio (malnova kaj nova testamentoj), latinigita el la greka kaj hebrea de Sankta Hieronimo kaj ties skolo (komence de la kvina jarcento post Kristo). Tiu Vulgato estis manskribiste kopiata, por ĝin konservi kaj transdoni, centojn aŭ pliĝuste eble milojn da fojoj, en diversaj landoj de kristanujo, kaj ĝi ankaŭ estis

reproduktita en sennombraj liturgiaj legaĵlibroj. Kiu volus kaj povus kompari la diversajn mankopiaĵojn, tiu propraserte konstatus, ke la kopio kiun li aŭ ŝi mem legas, estas malsama de tiu uzata en la najbara preĝejo aŭ kultura medio, kaj plukomparante, oni malkovrus, ke kelkdek aŭ kelkcent kilometrojn pli norde aŭ pli sude oni uzas ankoraŭ malsaman kopion. Se fine oni interesiĝus pri la unuaj bibliaj eroj tradukitaj al la

etnaj eŭropaj lingvoj kaj dialektoj (italaj, francaj, anglaj, germanaj, portugalaj ktp), eble oni venus al la konkludo, ke tiu Vulgato disrompiĝis en ... plurajn vulgatojn!

De tio, evidente, venas la neceso trajarcente perceptata en multaj ekleziaj kaj kulturaj medioj, revidi, revizii, priserĉi, priesplori la tekston ... por reakiri, se eblas, la originalan vulgatan tekston.

Renesancaj klopodoj

Aŭtonome provis trovi pli fidindan tekston de la biblio Erasmo el Roterdamo (1516), kaj la rezulto de lia laboro, farita precipe surbaze de ĵus ricevitaĵ grekaj tekstoj, ricevis poste pro vasta akceptiĝo inter evangelia kaj anglikana konfesioj la nomon *Textus Receptus* (Teksto akceptita), teksto kiu ja agitis la kulturajn akvojn, sed kontentigis tre malmultajn kompetentulojn. Novan provon rekonstrui la originan Vulgaton faris ĉe la pariza universitato Sorbono la konata Roberto Stefano (Robertus Stephanus), kiu en 1550 eldonigis Vulgaton, dividitan en versiklojn kritike korektitajn. Tiu eldono surbaze de diversaj malsamaj manuskripto-kopioj rezultigis „vulgatan” tekston, kiu ne plaĉis al la tiufaka sciencularo ... Aliajn, antaŭajn kaj postajn klopodojn, ni nun flankelas al la priserĉado de bibliŝatantoj, ne sen tamen mencii la kolosan *Poliglota Komplutena* (aperis en 6 volumoj, 1514-1517, en la universitata urbo Complutum, alinome Alcalá, Hispanio): tio estas la unua poliglote = plurlingve presita biblio, kiu en unu el siaj ses kolumnoj aperigis ankaŭ la Vulgaton.



Vulgato estis manskribiste kopiata, por ĝin konservi kaj transdoni, centojn aŭ pliĝuste eble milojn da fojoj, en diversaj landoj de kristanujo, kaj ĝi ankaŭ estis reproduktita en sennombraj liturgiaj legaĵlibroj.



Unua presita biblio en usona muzeo.

La romkatolika eklezio

Bibliŝatantoj sendube scias, ke la Konkilio de Trento (1545-1563) deklaris, ke la Vulgato de Sankta Hieronimo estas teksto „aŭtenta”. Ĉi tie „aŭtenta” signifas, ke tio estas teksto jure fidodigna kaj referencpunkto en liturgiaĵoj kaj seminarioj studoj. Sed la koncilio nek volis nek povis indiki, kiu teksto, inter la multaj, estas la vere aŭtenta versio, kaj instigis la papojn krei spertulajn komisionojn por rekonduki al la originala teksto.

La taskon prenis sur sin unue papo Siksto la 5a en 1580. Kiam la internacia komisiono, de li tiucele instalita, prezentis la reestabliton Vulgaton, sparkis plurflankaj kritikoj kaj protestoj ... Sekva papo, Klemento la 8a, kreis novan komisionon por revizii ĝin, komparante kun la originaj tekstoj, kiujn tiutempe oni opiniis malpli malsimilaj. Kaj tiel naskiĝis la *Vulgato Siksta-Klementa* (1592), kiu fariĝis disciplina normo en la katolika eklezio, kaj estis ne tute ignorata de anglikanaj kaj protestantaj medioj, kiuj ankaŭ baraktis en la serĉado de pli aŭtenta biblia teksto.

Moderna filologio

Sed dume surscenejiĝis, precipe en protestantaj kulturaj medioj, pli modernaj priserĉadaj hermeneŭtikaj metodoj kaj filologiaj konceptoj por rekonduki al la originalaj grekaj kaj hebreaĵoj tekstoj ... Tiuj pristudaj metodoj disvastiĝis kaj generis la certecon, ke la reviziitaj Vulgatoj entenas ankoraŭ multege da neekzaktaj kaj kopiistaj eraroj Kvankam veras, ke eĉ tiuj originalaj fontoj grekaj kaj hebreaĵoj entenas diversajn malsamaĵojn kaj manipulaĵojn, tamen ne bremsiĝis la deziro ree elsarki kaj revizii la *diversajn* „Vulgatojn”.

Dua Vatikana Konkilio

Tiu ĉi deziro fariĝis devo pro instigo de la dua Vatikana Konkilio, kies membroj arde postulis, ke la papo reprenu la taskon, ree redakti kaj aperigi kompletan latinan biblion, konforme al la malkovroj kaj la sciencaj kriterioj akumulitaj tra la lastaj du jarcentoj. En 1965 estis kreita de papo Paŭlo la 5a internacia komisiono plurcentmembra kun fakuloj el multe da sciencoj, kaj eĉ alia

kontrola komisiono ... La rezulto, kiun por la katolika eklezio en 1979 solene aprobis papo Johano Paŭlo la 2a, estis ... la „Nova Vulgato”!

Tiu ĉi eldono estas tiel grava, ke ĝi influis multajn tiusciencajn fakulojn kaj novajn tradukojn al diversaj nuntempe parolataj lingvoj, ankaŭ jam pro tio, ke ĉiu unuopa modifo estas akompanata, por la interesitoj, de longa kaj prava filologia ktp aparato.

Kiaspecaj korektoj estas plej notindaj? Oni kalkulas plurmilojn (aŭ ĉu plurcentmilojn?) da ili: versikloj forigitaj kaj versikloj aldonitaj, frazaraj modifitaj, foje ŝanĝantaj la sencon. La plejmultaj modifoj, tamen, elstaras nur por literaturistoj. La nova itallingva biblio, ekzemple, modlita sur la nova Vulgato, enhavas ĉirkaŭ okcent mil modifaĵojn! Multaj, certe, praviĝas pro lingvaj adaptiĝoj kaj liturgiaj bezonoj, sed multaj pro la novaĵoj de la Nova Vulgato.

Demandoj

Kiamaniere oni povas reteni la doktrinon de multaj kristanaj eklezioj, laŭ kiu la biblio estas „parolo de dio”? Ĉu dio do lasis koruptiĝi siajn vortojn? Pro tiu dia parolo iam la kristanoj ja interbatalis, ne nur dialektike, unu kontraŭ la alia. Eble hodiaŭ ili malkovros, ke la batalo ĉesis ne nur pro la ŝanĝiĝantaj interkonfesiaj rilatoj, sed ankaŭ pro tio, ke ne plu ekzistas la „Sanktaskribe motiviga apogilo”!

La koncepto de „biblio = parolo de Dio” jam tiom signife diseriĝis ĉe teologoj kaj religiaj responsuloj, ke utilas ne rifuzi jenan ĝen-montran komparon: imagu, ke vi per via aŭto eniras ampleksan trafikcirkolon, el kiu multas la elirejoj, ĉiuj markitaj per „biblio = parolo de Dio”, sed ĉiu unuope distingita per malsama difino. Nu, vi daŭre povos cirkle rondiri, ĉar ne troveblas la vere kontentiga difino!

Por eviti, tamen, tian problemon, la aprobantoj de la nova Vulgato certigas, ke nenio esenca suferis ŝanĝojn!

Armando ZECCHIN



Moderna klasikaĵo

1997. La aktuala, dua eldono estas zorge korektita. (Pro sia tre granda amplekso, la origina traduko fare de Auld enhavis plurajn nekonsekvencaĵojn, grandparte rilate al la varianta ortografio de diversaj nomoj.)

Por legantoj de ĉi tiu recenzo, kiuj ne jam legis la verkon, mi povas diri, ke temas pri aventurromano, verkata kaj prilaborata dum kelkaj jardekoj. En aparta romano, *La hobito*, Tolkien verkis pri mistera sorĉoringo, kiu regas areton de aliaj sorĉoringoj. Kiu posedas ĉiujn el la ringoj kaj scipovas ilin uzi, povas mastri la tutan teron, iĝi senmorta kvazaŭ-dio, kaj senscie esti tiom, kaj tiel, koruptita, ke neniu fiaĵo maleblas, por tiu mastro. Ĉar la senlima potenco, kiun donas la ringoj kune, plene koruptas ilian mastron. Nu, la ĉeffringon akiras hobito (speco de hometoj, en la fantazia mondo de Tolkien) nomita Frodo, kiu supozas ĝin nur kuriozaĵo, utila, ĉar kiam oni surfringigas ĝin, oni iĝas nevidebla.

En *La mastro de l' ringoj*, potenca sorĉisto, nomita Gandolfo, informas Frodon pri la danĝera karaktero de la ringo, kaj la neceso pereigi ĝin, kio fareblas nur per ĵeto en tre malfacile atingi-

blan vulkanecan monton.

Tamen nekredeble potenca fiulo, kiu jam posedas preskaŭ ĉiujn el la ringoj, strebas akiri, iel ajn, la ringon nun havatan de Frodo. La veturo al la monto por pereigi la ringon eblas nur per danĝeroplana penado, dum kiu abundas militoj, kaj vere strangaj popoloj diversnaturaj, amikaj kaj malamikaj. Kaj konstanta minaco kaj atencado fare de la potenca fiulo, kiu strebas konkeri kaj regi la mondon.

La tri volumoj de la romano ampleksas grandan, detalan priskribon de la multaj bataloj kaj de la kvazaŭ senfinaj misspertoj de Frodo kaj liaj akompanantoj.

La traduko farita de Auld estas neriproĉebla. La preso estas vere bona. Do al tolkienismuloj mi multe rekomendas ĝin.




Donald Broadribb

J. R. R. Tolkien: *La mastro de l' ringoj*, tr. William Auld. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2007. Tri volumoj kudre binditaj: 461 + 367 + 326 paĝoj. Neniu ISBN indikita.

Prezo ĉe FEL: 75 eŭroj + afranko.

Ĉu vere moderna klasikaĵo? Nu, pripensu: la ekapero de ĉi tiu libro, en sia anglalingva originalo, okazis en 1954. Dum la sekvaj jardekoj, pluraj dekoj da verkegoj, de tre diversaj aŭtoroj, estas eldonitaj, imite al la karaktero de ĉi tiu. Jam de 54 jaroj, ĉi tiu verko estas eldonita, kaj reeldonita, kaj rereeldonita, ne nur en sia anglalingva teksto, sed en preskaŭ kvindek aliaj lingvoj. Tri filmoj (po unu pri la tri volumoj) furioze sukcesis.

Tradukis ĝin en Esperanton William Auld; la unuan volumon eldonis Sezonoj en 1995, la duan en 1996, kaj la trian en



Ne por lernantoj, sed por spertuloj

Transitiveco de verboj estas unu el la plej malfacilaj elementoj de Esperanto, kaj ĝi povas erarigi eĉ spertajn parolantojn. Kiu frazo estas ĝusta: ĉu *La ligno fumas* aŭ ĉu *Mi fumas cigaredon*? Ĉu *La kompatindulo dronis en Skeldo*, aŭ ĉu *droniĝis en Skeldo*? Ĉu *Tiu ĉi domo datas de la 17a jarcento*, aŭ ĉu *datiĝas de la 17a jarcento*? Ĉu *La tero turnas en 24 horoj*, aŭ ĉu *turniĝas*? (Ambaŭ ekzemploj kun *fumi* estas ĝustaj, kaj *droni*, *datiĝi* kaj *turniĝi* estas ĝustaj.)

Tio, kion oni kutime nomas transitiveco aŭ netransitiveco, fakte simple estas parto de la signifo de la verbo. Oni povas diri, kiuj el la supraj frazoj estas ĝustaj, se oni scias, ekzemple, ke *droni* signifas „pereis pro sufokiĝo en akvo” (laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* 2005). Tiam estas klare, ke la ĝusta formo estas, ke *La kompatindulo dronis* – tio estas, pereis pro sufokiĝo en akvo – en Skeldo.

Instruante Esperanton, oni indiku klare, ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva, ne per nura uzado de tiuj terminoj, sed klarigante la signifon mem de la verbo, prefere per ekzemploj. Lernanto, kiu aŭdas la ekzemplan frazon *La esploristo datis la eltrovaĵon, uzante karbonon* 14 kapablos poste uzi la verbon *dati* eĉ pli ĝuste, ol se oni simple estus dirinta al li, ke tiu verbo estas transitiva.

La libreto de André Cherpillod, ŝajne, estas celita kiel simpla klarigo pri transitiveco por lernantoj. (La titolo asertas, ke ĝi „forigas la mitojn pri transitiveco de verboj sen peno”.). Se vere tio estas ĝia celo, tiam la libreto komplete fiaskas. Provi lerni pri transitiveco de verboj kaj pri la uzado de la akuzativo per tiu libreto estus kiel

provi lerni Esperanton per parkerigo de PIV kaj de PMEG.

La libreto estas multe pli utila en precize la mala rolo, nome kiel monografio pri la temo. Ĝi havas abundon da klarigoj, nur en la franca, kaj da ekzemploj, en la franca kaj en Esperanto. Fakte, ĝi estas monografio ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri la franca: ĝi klarigas, ekzemple, kiel ĝuste uzi, en la franca lingvo, participojn kun la verboj, kiuj nomiĝas *verbes pronominaux* en tiu lingvo. Cherpillod emas diri ĉion, kion li scias pri iu temo, sen konsidere, ĉu ĝi rilatas al la anoncita celo de la libro.


La aŭtoro, ŝajne, estas „atisto”: li klarigas la uzadon de la esperantaj participoj laŭ atisma vidpunkto, kaj tio devigas lin kuraĝe, sed malsaĝe, aserti, ke estas eraroj en la *Fundamento de Esperanto* kaj en la *Biblio*. Kaj iom ridindaj estas la notetoj komence de ĉiuj ĉapitroj, kiuj avertas, ke oni prefere unue legu la antaŭajn ĉapitrojn. Mala aserto, tamen, aperas komence de ĉapitro 7, kvankam ne estas klare, kial oni volus tie komenci la legadon de la libreto.

Resume, la libreto povas utili al spertaj esperantistoj, kiuj estos kapablaj identigi la okazojn – ja maloftajn – kiam Cherpillod malpravas, sed ne al la lernantoj, kiujn la aŭtoro, ŝajne, celis.

Yves BELLEFEUILLE

André Cherpillod: *Verbes transitifs, verbes intransitifs: démystifiés en dix leçons et sans effort*. En la franca, kun ekzemploj en Esperanto. Eld. la aŭtoro (Éditions de la Blanchetière), Courgenard, Francio, 2008. 28 paĝoj vinkitaj. ISBN 2-906134-80-5.

Poemaro pri la vivo



Poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo, multaj eroj kun ekologia inspiro. Fine poemoj pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj Eŭropo ankaŭ apartenas al la penso de Rejna. Poezio tre simpla, jen ritma, jen senritma. Troveblas kelkaj aludoj al aliaj poetoj en ŝiaj poemoj. Rejna de Jong estas persista poetino kun aparta voĉo. Plia virina voĉo gravas, eĉ se voĉeto modesta, minora.

Chris Declercq

Paĝoj: 76; 21 cm; vinktitaj;

Prezo: € 10,00

Informoj:

tif. +32 234 34 00;

tlk. +32 233 54 33

rete: butikiko@fel.esperanto.be

www.retbutiko.net

Furoro de **FEL**

BARATO

La barata ekonomio: miraklo neefika

Oni kutime nomas la aktualan periodon ekde 1991 *la reforma periodo* de la barata ekonomio. Dum tiu ĉi periodo pro diversaj strategioj oni „liberigis” la merkatojn kaj rapide ekkreskis la ekonomio. Rezulte, ekzemple, la fremdvalutaj rezervoj en la lando kreskis de 6 miliardoj da dolaroj en 1991 ĝis 208 miliardoj en 2007. Jen *Barato Lumanta* kaj *Nekredebla Barato* laŭ politikaj sloganoj.

En la jaro 2006-2007, la ekonomio de Barato kreskis je 9,4 %. La novaĵo, ke Barato estas unu el la plej rapide kreskantaj landoj en la mondo, kompreneble furoris, unuflanke inter

tiuj, kiuj laŭdis tiun ĉi rapidegan progreson, kaj aliflanke inter tiuj, kiuj denove atentigis nin pri la daŭre vasta malriĉeco en la lando. Ĉi tiu eseo fokusiĝos sur la dua flanko de la barata ekonomio, t.e.,

ne pri la *glora atingo* pasintjare raportata, ke Barato nun havas pli ol cent mil milionulojn – homojn, kiuj havas pli ol unu milionon da usonaj dolaroj. Male, ni restos ĉe la malpli raportata fakto (denove laŭ raporto pasintjara), ke en la jaro 2005, Barato havis 302 milionojn da malriĉuloj. Tiu cifero estas preskaŭ trioblo de la loĝantaro de Japanujo, kaj pli ol sesoblo de la loĝantaro de Sud-Koreio!

Sed kiu estas malriĉulo? Laŭ la barata registaro, malriĉulo estas homo kiu elspezas en unu monato malpli ol 11 dolarojn. Multaj esploristoj argumentas, ke tiu ĉi difino de la „novelo de malriĉeco” estas tute nerealistika, kaj, ke se oni levas la elspezkriterion al pli realismaj niveloj, multe pli da baratanoj estus malriĉaj. Ĉiaokaze, 72 % de tiuj malriĉuloj loĝas en la kamparaj regionoj de la lando. Iliaj vivoj kompreneble dependas ĉefe de la



En la jaro 2005, Barato havis 302 milionojn da malriĉuloj.



DAVEY BOT

En Barato pli ol 12 milionoj da infanoj laboras.

agrikulturo. La malriĉeco tie estas sezona afero, dependante de la pluvado kaj la rikoltado. Grandega nombro de baratanoj do vivas ĝuste ĉe la „malriĉeca linio”: jen super ĝi, jen sub ĝi.

Notindas, ke la grandega agrikultura sektoro en Barato, kiu vivtenas 60 % de la laborantaro, kontribuas nur je 28 % al la malneta enlanda produkto. Por la malriĉuloj, la galopanta kresko de la ekonomio ne havas multan signifon. Ni vidu la situacion en du sociaj sektoroj, la edukado kaj la sano. Kiel vi sendube scias, ambaŭ havas gravegan rolon en la takso de la vivkvalito de lando – la t.n. indekso pri la homa evoluigo.

Antaŭ ĉio, ni notu, ke en Barato pli ol 12 milionoj da infanoj laboras. La laborejoj gamas de danĝeraj fabrikoj al malfacilegaj agroj ĝis mezklasaj hejmoj. Almenaŭ por tiuj ĉi infanoj, la ekonomia miraklo de Barato restas fantazio. Por malriĉuloj en Barato ne estas facile edukigi siajn infanojn. Same kiel en multaj aliaj partoj de la „tria mondo”, grandegas la infrastrukturaj problemoj de la lerneja sistemo: manko de lernejoj, instruistoj kaj lernomaterialoj. La rezultoj estas mizeraj. Ekzemple, en mia gubernio Andrapradeŝo, malgraŭ 20-procenta kresko de la legopovo dum la lastaj dek jaroj, laŭ la popolnombrado de 2001, 49 % de la virinoj restas analfabetaj. Tiu proporcio estas multe pli alta inter virinoj de la minoritatoj kaj la indiĝenaj popoloj. Kiel ĉie en la mondo, ankaŭ

en Barato troviĝas forta korelacio inter virina edukado kaj la edukado de infanoj. Ekde 2005, neregistara organizaĵo en Barato faras grandskalajn studojn pri la stato de la landa instrusistemo. La enketo raportas, ke tutlande, 10 % de la infanoj, kiuj ne iras al la lernejo estas infanoj de analfabetaj patrinoj; kontraste, nur 2 % de tiaj infanoj estas idoj de legopovaj patrinoj. La edukado de virinoj do kontribuas signife al la edukado de infanoj.

Ĝuste la samon oni trovas ankaŭ en la sansektoro: la sano de la virinoj rekte kontribuas al la infana (kaj familia) sano. Kaj vidu kiel statas la sano de niaj virinoj. Unu el la (jam tro multaj!) hontigaj statistikoj barataj estas la patrina mortproporcio (angle: *Maternal Mortality Rate*, aŭ *MMR*). Malgraŭ la impona statistiko de la registaro, ke la *MMR* malgrandiĝis je 24 %, laŭ unu takso pli ol 130 000 barataj virinoj mortas ĉiujare dum aŭ post la akuŝo: po unu morto en kvar minutoj laŭ frappe trista reprezento de la faktoj. Kaj kial okazas tiu ĉi tute evitebla tragedio?

1. pro malbona kaj nesufiĉa nutraĵo – gravedaj virinoj en Barato meze plipeziĝas je nur 7 kg kompare al 12 kg en la evoluantaj landoj

2. ĉar nur 60 % havis antaŭnaskan sanprizorgadon.

3. pro tute malbona aliro al la sansistemo: ĝi estas plejparte urba – 80 % de la kuracistoj troviĝas en la urboj, same

kiel 75 % de la apotekoj kaj 60 % de la kuracejoj. Se entute ekzistas registaraj kuracejoj kun kuracistoj kaj flegistinoj, mankas vojoj kaj transportiloj de la vilaĝo al la kuracejo: rezulte, en kamparaj regionoj, tri el kvar akuŝoj okazas en la hejmo.

4. pro manko de trejnitaj homoj ĉe la akuŝo.

5. ĉar 60 % de la patrinaj mortoj okazas post la akuŝo – tamen, malpli ol 17% de virinoj ricevas ian ajn postnaskan sanprizorgadon.

Krom tiuj ĉi kaŭzoj registara raporto aldonas, ke „malaltaj niveloj de instruado inter virinoj signife pligrandigas la riskon de la patrino morto”.

Malbona edukistemo do rekte kontribuas al tragedioj en la sansektoro. Severaj mankoj en la registara sansistemo devigas homojn iri al altkostaj privataj alternativoj. Tiuj malriĉigas ilin kaj rezulte ili ne plu povas edukigi siajn infanojn – kaj tiel rekomenciĝas la malbona cirklo.

Ĉu entute eblas rompi tiun ĉi ciklon de malriĉeco? Nu, almenaŭ en la kazo de la *MMR*, tute certe jes! Vidu Srilankon: en la 1950aj jaroj, Srilanko havis *MMR*-on de 550; ĝi estis nur 30 en 1994. Plia statistiko: la infana mortproporcio en Barato estas po 85 mortoj por mil vivnaskiĝoj; la cifero por Srilanko estas 14. Eĉ Nepalo kaj Bangladeŝo atingis ciferojn de 76 kaj 77. Notindas, ke neniu el tiuj landoj ĝuis ekonomian kreskon de 9,4 %. Konklude, klaras la jenaj punktoj:

1. la rapidega ekonomia kresko de la barata ekonomio havis malgrandan efikon sur la vivo de la malriĉularo.

2. sen draste altaj kaj efikaj elspezoj en la sociaj sektoroj de la ekonomio, daŭre validos la supre menciitaj skandalaj faktoj pri la lando. Ili ne restas nur faktoj, sed rapide iĝas la fonto de signifa malkontento inter la malriĉularo tra la tuta lando.

3. kaj fine, la ekzemplo de Srilanko montras, ke por bona vivkvalito, mirakla ekonomia kresko nek necesas nek sufiĉas.

A. Giridhar Rao

Hispanio venkis, gastigantoj seniluziigis

La 13a eŭropa ĉampioneco pri futbalo *EURO 2008* okazis de la 7a ĝis la 29a de junio en Aŭstrio kaj Svislando. Ĝin organizis Unuiĝo de Eŭropaj Futbolasocioj (UEFA). En la turniro partoprenis 16 landaj teamoj, kiuj ludis unue en kvar grupoj kaj poste en eliminacia sistemo unu kontraŭ la alia. Eŭropa ĉampiono por 2008 estiĝis la teamo de Hispanio, kiu venkis la teamon de Germanio je 1:0 en finala matĉo en Vieno.

Por la trisemajna turniro, kiu okazis sub la devizo „Travivu la emociojn”, estis venditaj pli ol unu miliono da biletoj por 31 matĉoj, kiuj okazis en ok stadionoj en la landoj gastigantaj. Pli multe da vizitantoj havis nur la eŭropa ĉampioneco en Anglio (1,27 milionoj, en 1996) kaj Portugalio (1,16 milionoj, en 2004). Krom la spektantoj en la stadionoj ĉeestis pluraj milionoj da fanatikuloj en la oficialaj zonoj de la ludurboj, en kiuj sur filmuroj eblis spekti la matĉojn.

La ĉampioneco estis pozitive prijuĝita de la organizantoj, landoj-gastigantoj kaj ekspertoj. Krome oni pri-traktas ĝin kiel turniron, kiu plenumis

la altajn celojn. La prezidanto de UEFA, Michel Platini, laŭdis la organizantojn pro la bonegaj kondiĉoj rilate transporton, loĝigon, stadionojn kaj sekurecon.

La publiko montris sin akceptema, sed ne tre eŭforia kiel antaŭe ĉe similaj konkursoj. Tio certe okazis pro la frua elimino de la teamoj de ambaŭ gastigantaj landoj, sed ankaŭ pro la malbona vetero kaj ofta pluvo. La vetero kulpis ankaŭ pri la plej grandaj problemoj. Oni devis ŝanĝi entute la herban kovraĵon de la stadiono en Basel post la pluvbatalo inter la futbalteamoj de Svislando kaj Turkio, kaj fulmotondra pluvo en Vieno kaŭzis la interrompon de televida signalo al la tuta mondo en la duonfinalo inter Germanio kaj Turkio.

La prognozoj pri amasa alveno de turistoj al la gastigantaj landoj ne realiĝis. La zelot-zonoj en la ludurboj ofte ne pleniĝis.

El sporta vidpunkto *EURO 2008* okazis sur alta nivelo. Aparte la de la teamoj praktikata ofensiva futbalo kun la atingitaj 77 goloj certe entuziasmigis. Krome la turniro distingiĝis pro la granda spor-

thonesteco, ĉar la juĝistoj montris nur tri ruĝajn kartojn. Kiel atendite, oni ne demonstris novajn ludsistemojn, tamen la intenseco kaj rapideco de la futbala ludo plialtiĝis. Andy Roxburg, ano de la teknika studgrupo de UEFA, priskribis la spektitajn matĉojn kiel „nekredeblan miksaĵon el dinamiko kaj alta tekniko”. La defensive ludantaj teamoj, kiel la antaŭ kvar jaroj sukcesintaj grekoj, kiuj post tri malvenkoj en la grupa fazo devis forlasi la konkurson, ne ludis en tiu turniro gravan rolon.

Krom la grekoj seniluziigis ankaŭ la teamoj de la gastigantoj Aŭstrio kaj Svislando, kiuj ne sukcesis transpasi la grupan fazon. Ankaŭ Francio kaj Italio havis pli altajn celojn, sed ankaŭ ili ĉesigis sian partoprenon en la grupa fazo respektive en la kvaronfinalo. En la kvaronfinalo finiĝis la turniro ankaŭ por Portugalio kaj Nederlando, kiuj ludis en la grupa fazo la rolon de pretendantoj je la ĉampion-titolo. Pozitive surprizis la teamoj de Rusio kaj Turkio. La juna rusa teamo sub la gvido de la nederlanda trejnisto Guus Hiddink montris en kelkaj ludoj tre allogan futbalon.

En la turniro plej bone kaj konstante ludis la teamo de Hispanio, kiu pruvis sian superecon en ĉiuj matĉoj, escepte de la ludo kontraŭ Italio. En la finala matĉo ĝi demonstris, estinte kun nur unu avanulo, ofensivan futbalon kaj merite venkis la teamon de Germanio, en kiu mankis ideoj kaj golŝancoj.

EURO 2008 alportis rekordan enspezon de 1,3 miliardoj da eŭroj, el kiu la profito estas 700 milionoj da eŭroj. Per tiu sumo oni financos futbalajn evoluprojektojn en la membroŝtatoj de UEFA.

Evgeni GEORGIEV



anoncetoj

Vizitu IperNity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 750 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpage prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0259-6587

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 18 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto



enciklopedieto kun
informoj kiel telefoni
el kaj al eksterlando

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2009

via poŝamiko dum la tuta jaro 2009



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezoj en p.4)

certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)